

Citaĵoj el la verko *Kun siaspeca spico* de Raymond Schwartz
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 513, 1973.08.08 & 11

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon, en nia nekrologo pri Raymond Schwartz, ni anoncis la ĵusan aperon de nova verko de tiu spritulo kaj ĵonglisto de nia lingvo. Temas pri la libro *Kun siaspeca spico* !, kiun eldonis Stafeto okaze de sia 20-a naskiĝjaro kun 4 aliaj titoloj : *Ni kaj Ĝi* de Gaston Waringhien ; *La arbo de la sciado* de Pio Baroja, *Vojo kaj vorto* de Roberto Passos Nogueira kaj *Esploroj* de Baldur Ragnarsson. Stafeto anoncas aliajn titolojn, inter ili 700-paĝan romanon de John Francis, kies titolo estas *La granda kaldrono*. Kiel vi konstatas, nia literaturo daŭre riĉiĝas je novaj titoloj.

A.- Honore al Raymond Schwartz ni dediĉos kelkajn somerajn elsendojn al legado de citaĵoj el la ĵus aperinta verko ...*kun siaspeca spico* !, kiu estas, kiel vi konstatos, minejo da spritaĵoj. Povu tiuj leg-elsendoj vin kuraĝigi tuj aĉeti la koncernan libron kaj samtempe akiri la ĝis nun neelĉerpitajn verkojn de tiu granda verkisto.

Cl.- ...*kun siaspeca spico* ! kunigas diversajn verkojn: poemetoj akompanas prozaĵojn pli malpli longajn. Komuna trajto : ŝercemo. El poemeto verkita kunlabore kun Rabelais ni legas tiun ĉi averton:

A.- *Libro-amik', legonte ĉi volumon
senigu vin de grumblo kaj afekt'!
Ja bonintenc' gvidadis mian plumon,
eĉ se Tabu' fariĝis ŝerc-objekt'; [...]*

Cl.- *Konkludo :... vidi vin en kaĉ' de l' ĉiutago
Restigis min ĉe tiu aksiom',
ke « pli ol plor' valoras ĝoja blago,
ĉar estas Rid' proprajo de la hom'! »*

A.- La libro komenciĝas kun preparaj antaŭ-ekzercoj. Ni citas kelkajn el ili, lasante al vi la ĝojon mem malkovri la aliajn :

Cl.- *Bonan blagon, sinjoro. Kiel vi farsas ?*

A.- *Pirotekniko estas unu afero, parotekniko estas alia. Sed la difino de l'unua validas ankaŭ por la dua:
« Arto prepari artfajraĵojn. Scienco pri eksplodaĵoj » (PIV)*

Cl.- *Kelkaj eliris matene kun bambulancoj. Kaj ili revenis vespere... en ambulancoj.*

A.- *La plej Esperanta vorto - oni eĉ povas diri «la plej ĝisvoste Esperanta » - estas verŝajne la vorto APLAŬDU.
Se vi forstrekas ĝian kapon, tuj reestas nova kapo sur la korpo mallongigita. Entute kvin fojojn vi povas detranĉi la kapon kaj tamen restos en la fino ankoraŭ vivovokanta imperativo :
A/plaŭdu
P/laŭdu*

L/aŭdu
Aŭ/du
D/u
U

Cl.- Tiujn ekzercojn sekvas pli longaj tekstoj, kiujn Raymond Schvvartz nomas « meditataj ».

A.- En tiu, kiu titolas *Pri la higiena valoro de Esperantaj gazetoj* ni interalie legas :

Cl.- « *Ĉar la nunepokaj aktualaĵoj estas malagrablaj, sekve ĝenaj por nia sano, ŝajnas pli saĝe konsumi ilin nur malvarmaj, ni diru kun trimonata malfruo. Kaj ĉi tie intervenas la utila rolo de la Esperantaj gazetoj. Legi nur Esperantajn gazetojn havas grandan avantaĝon : kiam pere de ili vi ekkonos malfavoran « aktualaĵon », tiu aktualaĵo havos jam tri monatojn malantaŭ si, sekve:*

- a) *aŭ vi estos jam kutimiĝinta al la nova mizero kaj la aktualaĵo ne plu ĝenos vin.*
- b) *aŭ la situacio intertempe ankoraŭ pli malboniĝis, kaj pri la « nova informo » en via Esperanta gazeto vi diros nur : « Ha, tiam estis la bela epoko ! »*
- c) *aŭ - kelkfoje okazas mirakloj ! - la vivo refariĝas normala; tio estas ĝojiga, kaj ridetante pri la forpasinta danĝero vi moketos kiel pri stulta ŝerco.*
Ĉiukaze vi ne forzos vian koleron je kosto de via sano kaj de via vivkunulo. Kaj tio estas la ĉefafero !

A.- Kaj en alia, kiu titolas *Sub la regno de Muktuk 1-a* ni trovas interalie priskribon de malnovaj aŭtomobiloj kun komika rilato kun **Gaston Waringhien**. Aŭdu :

Cl.- « *Oni ne povas ne miregi pri la eksterordinaraj progresoj faritaj en la aŭtomobil-industrio, se oni komparas la modernan veturilon kun ĝia praavo el la jaro 1895, praavo, kiu konsistis esence el blovoj, stertoroj, ĝemoj, gargaroj, kartavoj, balbutoj kaj vomoj kaj kraĉoj kaj sputoj kaj vi pensas, ke estus saĝe ne plilongigi tiun liston, sed ne timu, mi ne uzos la teknikan esprimon, kiun vi atendas, ĉar mi tenas je via dispono la eŭfemismon **gastonoj**! Mi scias, ke tiupunkte mia eminenta kobolda kamarado **Gaston Waringhien** ne konsentas kun mi, sed ŝajnas, ke en tiu ĉi afero li ne povas esti plene neŭtrala. »*

A.- Dise en la libro promenas poemetoj sub la titolo *Eksterkadre*. Por konkludi nian hodiaŭan prezenton de ...*kun siaspeca spico !* de Raymond Schwartz, jen kelkaj el ili :

Cl.- **Konstato** : Estas kurioze,
kiel ofte ni
kredas iun superruzi
kiu ruzas pli !

A.- **Al pesimistoj**: Vi volas vin pendigi?
Bonege! Sed sen hasto !
Kaj lasu min instigi:
Komencu per... prokrasto !

Cl.- **Aŭtuna agordo**: La folioj jam forvelkas
kaj en stalo la bovinoj,
se neniuj ilin melkas
ploras kiel ĵusvidvinoj.

A.- La venontan semajnon ni revenos al tiu libro ...*kun siaspeca spico* ! de Raymond Schwartz, kiu estas minejo da spritaĵoj.

CL- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Gis reaŭdo!

Kopirajto © Cl.aude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), julio 2012